9e JAARGANG No. 10 VERSCHIJNT MAANDELIJKS 15 OCTOBER 1947

La Progresanto

REDACTIE-COMITÉ: G. P. DE BRUIN, G. J. DEGENKAMP, F. FAULHABER

STUDIEBLAD VAN DE BOND VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 861188

W. F. KRUIT, H. KUYT, JAC. LEM JR., H. VAN LIER, J. VAN SCHEEPEN, H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

VORT KUNMETO

La gramatikon oni lernu per la lingvo,
Ne la lingvon per la gramatiko.
(D-ro C. de Vooys).

ENKONDUKO.

Esperanto estas aglutina lingvo. Tio signifas laŭ la difino de „Plena Vortaro", ke ĝi povas formi vortojn per kunmeto de memstaraj vorteroj, kiuj konservas ĉie sian propran signifon.
La kutimo kaj la logiko kreis dum la tempo regulojn, per kies esploro oni povas faciligi al si la kreadon de kunmetitaj vortoj.
En ĉi tiu artikolo ni ne parolas pri „vortfarado", sed nur pri „vortkunmeto". Sub „vortfarado" oni komprenas la kreadon de vortoj per unu vortradiko, aldonante al ili ilian gramatikan finaĵon. „Vortkunmeto" estas la interligo de pluraj radikoj. La signifon de iu simpla vorto oni povas plidetaligi, pliklarigi per aldono de unu aŭ pluraj vortradikoj. Ekz. „pordo" estas nur unu vortradiko, kaj ĝi indikas la ĝeneralan komprenon. Sed „dompordo" ekzistas el du vortradikoj kaj la unua „dom" difinas la duan „pord". (Kiam oni konsideras la gramatikan finaĵon memstara vorto, la ĵus menciita simpla vorto „pordo" estas fakte jam kunmetita.)

ANALIZO.

Laŭ regulo 11a de la gramatiko oni povas formi kunmetitajn vortojn per simpla kunigo de la vortoj; la ĉefa vorto staras en la fino.
Laŭ ĉi tiu regulo la ĉefa vorto staras en la fino. La ĝin antaŭirantaj vortoj sekve klarigas aŭ difinas ĝin. La analizo okazas sinsekve de la lasta al la unua vorto. „Dompordo" estas laŭ tio: pordo de domo. „Fumtabako" estas tabako (destinita) por fumado kaj „tabakfumo" estas fumo de tabako.
Sed oni atentu, ke prepozicioj, numeraloj, korelativoj kaj la prefikso (adverbo) „ne" staras tuj antaŭ la vorto, kiun ili difinas. Ĉe la analizo de la vortoj de dekstro al maldekstro perdiĝas ĉe ili la sinsekvo kaj ili ricevas sian analizan lokon tuj antaŭ sia koncerna vorto:
endoma: kiu (kio) estas en (la) domo,
unutone: per unu tono,
ĉiutage: en ĉiu(j) tago(j),
sinnekonado: (daŭro) ne koni sin (mem).
Laŭ la ĝusta sinsekvo la lasta vorto donus eĉ tutan eraran rezulton: (daŭro) koni ne sin (mem).

LIGA LITERO.

Ĉar per la simpla kunmeto de nuraj radikoj oni kelkfoje ekhavas vortojn malbelsonajn aŭ tute ne elparoleblajn, oni povas meti inter la radikojn ligan literon, ĉi tiu liga litero estas tiu, kiun la koncerna vorto havus, se ĝi estus uzata memstare en la frazo. „Akvfalo" estas neprononcebla vorto. La du radikoj estas „akvo" kaj „falo", sekve estas: „akvofalo". „Vivpova" signifas: kiu (kio) povas vivi, do: „vivipova".
En kelkaj kunmetoj oni ofte metas krom la liga litero ankaŭ la „n" de la rekta

komplemento. Nenio(n)farado, si(n)mortigo. Tiu „n" estas tute nenecesa. Oni diras ja ankaŭ: cerborompa kaj ne cerbonrompa. En la kunmetoj kun la pronomo „si" la lingva kutimo, apliki ĝin kun „n" estas tiom ĝenerala, ke kontraŭi ĝin ne plu eblas. La direkta „n" ĉiam trovas sian lokon apud la liga litero: hejmeniri.

RILATOJ.

La kunmetoj povas rilati:

1e. rilaton aŭ posedon:	sunlumo, lumo de suno;
2e. materialon:	orĉeno, ĉeno el oro;
3e. epiteton:	membroabonanto, membro (kiu estas) abonanto;
4e. singularon:	dompordo, pordo de domo;
5e. pluralon:	ĉiutage, en ĉiu(j) tago(j);
6e. direkton:	supreniri, iri al supro;
7e. rektan komplementon:	sinmortigi, mortigi sin;
8e. adj. adv. komplementon:	mortbati, bati morta;
9e. vorton kun prepozicio:	arbaro, aro da arboj;
10e. vorton kun artikolo:	endoma, en la domo.

Laŭ principo de sufiĉo oni povas forlasi la vorton, kiu en la kunmeto estas superflua: bel(ec)o; pres(it)aĵo.

AFIKSOJ.

La afiksoj pro sia speciala rolo, kiun ili havas en la lingvo, ne ĉiam obeas la ĝeneralajn regulojn:

a. Ĉe kunmeto ili ne ricevas ligan literon. Por eviti miskomprenon oni skribas tamen: posteulo.
b. La sufiksoj ĉj kaj nj formas kun alia vorto novan radikvorton. (Ili estas ligataj ne al la radiko, sed al kripligita vorto.)
c. La sufiksoj aĉ kaj eg, et kaj in devus esti prefiksoj. (Ili ne estas la ĉefaj vortoj ĉe kunmeto):
   aĉhomo; homo, kiu estas aĉa (komparu: fihomo; homo, kiu estas fia);
   ethomo; homo, kiu estas eta (komparu: etburĝo; burĝo, kiu estas eta (malgrandanima);
   inhundo; hundo, kiu estas ina (inseksulo) (komparu: virhundo; hundo, kiu estas vira (virseksulo).

PREPOZICIO KUN VERBO.

Prepozicion oni povas ligi kun verbo, sed ofte oni faras tion nelogike. Oni uzu prefikse tiun prepozicion, kiun oni povas (enpense) ripeti post la verbo.
„Aliri" signifas: iri al;
„enveni" signifas: veni en k.t.p.;
„Elrigardi" en la signifo de „aspekti" ne estas: rigardi el;
„subaŭskulti" ne estas: aŭskulti sub.
Plue oni povas alligi prepozicion, kiam ĝi estas adj. adverbo. Kompl.: „kunbalai balai kunaj.

ADJEKTIVO KUN SUBSTANTIVO.

Ĉe kunmeto de du substantivoj oni facile komprenas, ke ambaŭ konservas sian substantivecon, „vaporŝipo" estas ŝipo (movata) per vaporo, sed nepre ne: vapora ŝipo.
Sed ankaŭ alia vortspeco havas apud substantivo substantivan karakteron. „Dormoĉambro" estas: ĉambro (destinita) por dorm(ad)o. Tial oni skribas „dormoĉambro" sed ne: dormiĉambro.
Oni speciale atentu la kunligon kun adjektivo. „Verkredo" signifas: „Kredo pri vero, sed tial ĝi ne estas ankoraŭ la „vera kredo". Kunmeto de adjektivo kun substantivo, se la unua ne havas substantivan karakteron, estas malĝusta.
„Ruĝvango" ne estas: vango de ruĝo. La signifo de „ruĝ" restas adjektiva kaj oni devos do apartigi la du radikojn kaj aparte skribi: „ruĝa vango".
Pluraj prefiksoj estas adjektivaj, tamen kunligiĝas kun substantivo:
„fihomo" estas: fia homo, „praarbaro" estas: praa arbaro k.t.p.
Per tio ili agnoskas, ke la afiksoj havas apartan rolon ĉe la vortkunmeto.

RESUMO.

La supre montritaj reguloj estas ĉerpitaj el la lingvoapliko. Se la reguloj ne kon-

POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 10. Vertaal in Esperanto:

De 4e naamval.

De onderwijzer vergaf de jongen zijn slechte gedrag. Dertig jaren heeft hij in de poolstreken doorgebracht. De oude vrouw hield veel van haar hond, de kleine witte poedel. Reeds vier maal heb ik zijn medewerking verzocht. Jan houdt meer van zijn broer dan van zijn zuster. De boekenkast, welke ik van vader kreeg, is twee meter hoog. De vrouw bemint niemand anders dan haar echtgenoot. Het vorig jaar brachten wij tien dagen door in de omgeving van Arnhem. De kwajongen gooide de bal de kamer in en trof de oude man.

Vertaling van opgave 8.

Johano kaj lia[1]) edzino promenis en la ĝardeno. Ili tre ŝatis[2]) sian ĝardenon kun ĝia bela, maljuna[3]) arbo. Tie ili trovis ripozon kaj distron[4]) post sia[5]) ĉiutaga laboro. Estis novembro; la arbo jam perdis siajn[5]) foliojn kaj la rozarbeto[6]) siajn florojn. La merlo jam ne[7]) aŭdigis sian kanton. Ĝi[8]) foriris kun sia[9]) familio al pli varmaj regionoj[10]). Johano rakontis al sia edzino pri la birdoj kaj iliaj[11]) kutimoj. Atente ŝi aŭskultis[12]) liajn vortojn. Kiam li silentis, ŝi petis al li pli[13]) rakonti pri ŝiaj[14]) malgrandaj amikinoj.

1) Niet: *sia; sia* mag niet voorkomen in het onderwerp; het onderwerp is: Johano kaj lia edzino. 2) Ook: *amis.* 3) Niet: *malnova;* dit gebruike men slechts bij levenloze dingen. 4) Beter dan: *malstreĉon, amuzon.* 5) Niet: *ilia;* als het bezittelijk voornaamwoord een bezit aanduidt van het onderwerp dat 3e persoon is (*li, ŝi, ĝi, oni, ili* of de namen zelf) gebruike men *sia.* 6) Beter dan: *rozarbedo; arbedo* is een struik, die bij de grond reeds vertakt, wat bij een rozenboompje niet het geval is, dit is werkelijk een heel klein boompje. 7) Ook: *ne plu.* 8) Niet: *ŝi, li;* als het natuurlijk geslacht niet genoemd wordt of van geen belang is, gebruike men *ĝi.* 9) Niet: *ĝia; kun sia familio* behoort niet tot het onderwerp, dit is een bepaling. Zie ook de eerste zin, hierin is *kaj* een voegwoord en verbindt 2 onderwerpen tot één. *Kun* is een voorzetsel en behoort tot een bepaling. 10) Niet: *ĉirkaŭajoj;* vergelijk: *La ĉirkaŭajo de Arnhem estas tre bela. En la nordaj regionoj estas malvarme.* 11) Niet: *siaj;* let op het verschil: *J. rakontis pri la birdoj kaj iliaj* (van de vogels) *kutimoj. J. rakontis pri la birdoj kaj siaj* (van Jan) *kutimoj.* 12) Beter dan: *aŭskulti al;* dit is een z.g. nationalisme. *Aŭskulti* is een gewoon overgankelijk werkwoord. 13) Let op het verschil tussen *pli* en *plu: Rakontu plu-* vertel verder. *Rakontu pli-* vertel meer. Hoewel in sommige gevallen beide een bijna zelfde betekenis hebben, moet men toch goed kunnen onderscheiden. Vergelijk: *Li ne havas plu monon* (Vroeger was hij rijk maar heeft nu niets meer). *Li ne havas pli da mono* (niet meer dan een bepaalde hoeveelheid. 14) Niet: *siaj;* de betekenis is: *Ŝi petis al li, ke li pli rakontu pri ŝiaj* (de la edzino) *amikinoj.*

---

traŭas la logikon aŭ klarecon, ni povas trankvile submeti nin al ili. Por faciligi la superrigardon ni starigos ekstrakte la regulojn:

1. Apliko de la 11a regulo de la gramatiko.
2. Ne kunmeteblaj estas: artikolo, konjunkcio kaj interjekcio.
3. Liga litero, kiam la prononco aŭ bonsoneco tion postulas.
4. Prepozicion oni ligu al verbo, nur kiam oni (enpense) povas ripeti ĝin aŭ kiam ĝi estas adj. adverba kompl.
5. La afiksoj pro sia speciala karaktero ludas apartan rolon. Ili ne havas ligan literon.
6. La analizado de kunmetitaj vortoj komenciĝas ĉe la fina vorto kaj progresas sinsekve al la unua. Ĉiu radiko ricevas sian originan formon. La prepozicioj, numeraloj, korelativoj kaj la prefikso „ne" restas antaŭ la vorto, kiun ili difinas.

J. van Scheepen.

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

H. Velthove.

Vrouw: Kan je niet even de stofzuiger nakijken? Hij doet het zo slecht.

Man: Ik heb hem de vorige week toch nagekeken en toen deed ie het weer goed.
V.: Ja, hij draait wel, maar hij zuigt haast niet.
M.: Ik snap er niks van. Afijn, als ik me geschoren heb, zal ik wel eens kijken.
V.: Ik zal hem vast uit de kast halen, anders vergeet je het toch.
M.: Ziezo, klaar met scheren. We zullen dus nu die stofzuiger maar eens uit elkaar halen. Zo van je werk, kan je weer voor je vrouw gaan ploeteren.
V.: Nou, nou, je hebt het hard.
M.: Kom nou eens kijken. Een wonder, dat ie het niet doet. De stofzak zit halfvol. Ik wed, dat hij weer werkt, als ie is leeggemaakt.
V.: Hij is toch nog niet helemaal vol.
M.: Maar snap je dan niet, dat, als de zak vervuild is, (dat dan) de stofzuiger niet meer zuigt?
V.: Hoe werkt zo'n ding dan eigenlijk?
M.: Dat zal ik je vertellen. Ik zal zo'n ding in hoofdtrekken even schetsen. Kijk, hier heb je er een langsdoorsnede van.

Ĉu vi havas okazon ekzameni la pneŭmatikan senpolvigilon. Ĝi funkcias tre malbone.
La pasintan semajnon mi ja ekzamenis ĝin kaj tiam ĝi refunkciis bone.
Mi scias, ĝi efektive turniĝas, sed ĝi preskaŭ ne malblovas.
Mi tute ne komprenas. Nu, post la razo mi ekzamenos.
Mi jam prenos ĝin el la ŝranko, por ke vi ne forgesu.
Jen, finita la razo. Mi do nun malmuntu la senpolvigilon. Apenaŭ (reveninte) el la laborejo, oni povas ree penlabori por la edzino.
Nu, nu, via vivo malfacilas.
Jen, venu rigardi. Ne mirige, ke ĝi ne funkcias. La polvosako estas duone plena. Mi certas, ke ĝi refunkcios, kiam ĝi estos malplenigita.
Ĝi ja estas ankoraŭ ne tute plena.
Sed, ĉu vi do ne komprenas, ke, se la sako estas polviziĝinta, (ke tiakaze) la senpolvigilo ne plu malblovas?
Kiel tia aparato do fakte funkcias?
Tion mi klarigos al vi. Ĉeflinie mi skizos tian objekton.
Rigardu, jen estas ĝia laŭlonga sekcaĵo.



C is de romp. Aan het ene eind zit het deksel B. Tussen de romp en het deksel is de rand van de stofzak D vastgeklemd. F stellen de waaiers voor, die worden aangedreven door electromotor H.
Zo'n waaier bestaat uit twee ronde platen, waartussen zich de schoepen be-

C estas la trunko. Ĉe unu flanko troviĝas la kovrilo B. Inter la trunko kaj la kovrilo pinĉpremiĝas la rando de la polvosako D. F montras la padelradojn, turnatajn de elektra motoro H.
Tia padelrado konsistas el du rondaj platoj, inter kiuj troviĝas la padeloj. En

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

J. Lem.

Opgave 10.

1. Er wordt gebeld, ga (eens even) zien wie daar is. 1. Wees zo goed mij uw vulpen te lenen; ik heb de mijne vergeten. 3. Tijdens de Duitse bezetting moesten wij ons werk voor Esperanto onderbreken. 4. Dadelijk na de bevrijding begon de Esperanto-beweging weer op te leven. 5. Tot nu toe slaagden wij er echter nog niet in het verloren terrein weer geheel te heroveren. 6. Veel arbeid zal moeten worden verzet en veel teleurstellingen zullen wij nog moeten ondervinden, voordat wij het peil van vóór de oorlog hebben bereikt. 7. Daarom doen wij een beroep op allen, die de internationale taal Esperanto een goed hart toedragen *(bonvoli, esti bonvola)*. 8. Platonische *(platonaj)* liefdesverklaringen baten ons echter niet; wij behoeven de daadwerkelijke medewerking van alle goedwillenden. 9. Toen wij zouden (gaan) wandelen, begon het te regenen; daarom besloten wij ons uitstapje uit te stellen. 10. Niet ieder die oordeelt *(ieder die oordeelt* vertalen met één woord), is een rechter. Een groep bomen is geen bos. Niet ieder die zingt *(ieder die zingt* vertalen met één woord), is een (beroeps)zanger. 11. Indien gij wenst dat ik uw brieven beantwoord, moet gij steeds een postzegel insluiten, want ook ik krijg ze niet cadeau. 12. Hebt u niets vergeten? Komt u nog eens terug? Hebt u reden tot klagen, zeg het ons; zijt gij tevreden, zeg het anderen.

Vertaling van opgave 9.

1. Dum mi estis skribanta, la knabino ludis per sia pupo. 2. Ludante kun sia amikino, la knabino falis kaj rompis al si kruron (pro tio ŝia kruro rompiĝis). 3. Refreŝiginte nin, ni daŭrigis nian promen((ad)on kaj atingis nian hotelon antaŭ vesperiĝo. 4. Parolante (ekparolante), li metis siajn notojn sur la pupitron kaj trinkis iom da akvo. 5. Post kiam la delegito de sekcio Amsterdam estis parolinta, la estraro transprenis la proponon. 6. Ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ. 7. Farinte vian taskon, vi ankoraŭ unufoje relegu ĝin kaj korektu eventualajn erarojn. 8. Fidele vizitadu la konversaciajn vesperojn de via klubo; ili estas pli instruaj (lernigaj) ol vi eble supozas. 9. Tiu ĉi somero karakteriziĝas (estas karakteriza) pro eksterordinare bela vetero. 10. Denove (ree) oni devis peti helpon de la fajrobrigado. 11. Mi ne plu (jam ne) povas memori kie kaj kiam mi renkontis lin, nek kial mi diris tion kaj kion li respondis. 12. Kio estas via ofico (metio), kie vi loĝas, kiun aĝon vi havas (kiomjara vi estas) (kiom da jaroj vi havas), je kioma horo la akcidento okazis? 13. Dum ega fulmotondro la fulmo trafis la farmejon de N. La domo tute forbrulis. Dek porkoj kaj du ĉevaloj pereis en la flamoj. 14. Kun etenditaj brakoj la bubo iris renkonte al sia patro. 15. Mensogulo estas kredata de neniu; kaj al trompulo oni rifuzas la konfidon.

---

vinden. In de linkse ronde plaat is een gat E, waardoor de lucht wordt aangezogen om er aan de omtrek van de waaier te worden uitgeslingerd.
Aan de rechtse ronde plaat zit de naaf G, waarmee de waaier op de motoras is bevestigd.
De waaiers vormen dus met het achtergedeelte van romp C de ventilator. Ook de achterzijde van de romp is met een deksel (J) afgesloten om de waaiers met motor te kunnen monteren en demonteren.

la maldekstra ronda plato estas truo E, tra kiun la aero estas malblovata por esti elĵetata ĉe la periferio de la padelrado.
Ĉe la dekstra ronda plato troviĝas la nabo G, per kiu la padelrado estas fiksita sur la motorŝafto.
La padelrado kun la malantaŭa parto de la trunko C do formas la ventolilon. Ankaŭ la malantaŭa parto de la trunko estas fermita per kovrilo (J) por ebligi la munton kaj malmunton de la padelradoj kun la motoro. (Finota).

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het red.-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 15. Vertaal in Esperanto:

Dumas woonde eens een zeer officieel diner bij. Na afloop van de maaltijd vroeg een kennis hem, of hij het nogal getroffen had met zijn tafelburen.

„Schei uit, kerel," antwoordde Dumas nijdig, „als ik er niet zelf geweest was, had ik me dood verveeld."

Wist U dat het juist in een tijd van spanning en angst zo belangrijk is, dat men goed ademhaalt?

„Door goed en diep inademen door de neus en door uitademen door de mond verbetert de hartslag en vliegt veel onrust, angst en gejaagdheid, die beklemming veroorzaken, waardoor we ons zo ziek en ongelukkig kunnen voelen, in het luchtruim weg!"

(Huishouding van Nu.)

Vertaling van opgave 12.

ĈU MINACAS TROLOĜATECO?

La kresko[1]) de la nederlanda loĝantaro ne estas memstara. Aliaj landoj montras la saman bildon. Kiuj ŝancoj ekzistas, ke tio kondukas al troloĝateco, al mizero? Kiel oni scias, ĉi tio estis la granda timo[2]) de Th. R. Malthus (Proks. 1830a)[3]). Ĝis nun la bonstato estas, malgraŭ la amasa kreskado de la nombro da loĝantoj de la okcidenta mondparto[4]), altiĝinta, sed[5]) ne malaltiĝinta. Tio, kio ebligis ĉi tiun altiĝon, estis la fabela disvolviĝo de la produkto- kaj trafiko-teĥnikoj[6]). La ekspluatado de la naturaj helpofontoj teraj pro tio multe kaj multe pli liveris ol antaŭe[7]). Ĉu tiuj ĉi helpofontoj elĉerpiĝos? Ne en antaŭvidebla[8]) tempo. Granda parto el[9]) ili estas neelĉerpebla[10]) (la agroj[11]), la riveroj), alia parto sufiĉas ankoraŭ por miloj da jaroj, krome[12]) grandegaj helpofontoj estas tute ne ekspluatataj. Krom tio la kreskado de la popolo havas siajn limojn. Motivo por maltrankvilo do[13]) ne ekzistas.

1. Ook: *pligrandiĝo*. 2. *Angoro* is te sterk uitgedrukt. 3. De bijvoeglijke uitgang wordt dikwijls weggelaten. 4. Door toevoeging van „parto" wordt het geheel duidelijker. 5. Hoewel in de tekst het voegwoord „en" wordt gebezigd, is de tegenstelling duidelijker met „sed". 6. Ook: *teknikoj*. 7. Ook: *pli frue*. 8. Ook: *transvidebla*. 9. Duidelijker dan *de*. 10. Ook: *eterna, nepereonta*. In het enkelvoud, daar het slaat op „parto". 11. Ook: *kulturaj kampoj, grundoj*. 12. „Daarnaast" heeft hier de betekenis van „bovendien". 13. Ook: *sekve*.

KIO AJN....?

La subjunktivo en la nederlandaj esprimoj „Wat er ook gebeure,.... Wat het ook zij,...." k.s. evidente havas ekvivalentojn en diversaj lingvoj, ĉar en Esperanto oni renkontas ofte „Kio ajn okazu,.... Kio ajn estu,...." kaj nur tre malofte „Kio ajn okazos,...." Kaj tamen ni opinias, ke la subjunktivo ne estas pravigebla en tiaj frazoj. La subjunktivo estas modo, kiu neniam estas memstara, sed ĉiam indikas agon, kiu rezultas aŭ povas rezulti el alia ago. Eĉ en ŝajne memstaraj frazoj la subjunktivo de verbo estas rezulto de nenomita alia verbo, ekz.: „Vivu Esperanto!" = ni deziras, ke vivu Esperanto. En frazoj kia „Kio ajn okazu,...." oni ne povas montri alian agon, el kiu rezultas „okazu". Pro tio „gebeure" devas esti en Esperanto estanta tempo, same kiel „zijt" en „Waar ge ook zijt,...."

Dem.: En P.V. troviĝas la vorto „poŭpo". Ĉu tiu vorto estas ĝusta? Kaj kia estas la elparolo?

Resp.: „Poŭpo" ne estas oficiala. Esperanto havas nur du diftongojn: „aŭ" kaj „eŭ", kies elparoloj estas resp. *aw* kaj *ew*, ne *ow* kaj *eu*, kiel oni ofte aŭdas. La diftongo „oŭ" ne ekzistas, sed estas nesolvita demando, ĉu oni rajtas kunmeti „o" kun „ŭ" kiel en „poŭpo". La vorto tamen jam estas ĝenerale uzata. La elparolo de „oŭ" estas *ow* kiel en *Gouda, blauw*.

ĈU NI KOREKTU LA HISTORION?

KIU ESTAS LA AŬTORO DE IDO?

(Daŭrigo).

Ĵaluzo, kolero, deziro de venĝo, ambicio aŭ alia sento estis pli fortaj ĉe s-ro de Beaufront ol liaj preferoj, aŭ, se vi volas, liaj lingvaj konvinkoj. Alprenante Idon, li devis fari perfortaĵon al si mem, al sia karaktero. S-ro Berger opinias, ke li ludis pli bone la rolon de advokato de Esperanto en la Delegacio ol tiu de Ido. Eble. Li estis funde konservema, kvazaŭ de naskiĝo, kaj konservema li restis, poste, inter la idistoj. „Sed", skribas s-ro Berger, „li estis kapabla defendi aferon eĉ kontraŭ siaj konvinkoj, se li tion juĝis utila. Oni ne devas forgesi, ke li estis jezuito. La celo atingota pravigas la rimedojn uzatajn." Certe, tiaj malmoderaj esprimoj nenion aldonas al la valoro de la pruva rezono. Sed la historiisto ne estos juĝata malmodera aŭ nejusta, kiam li asertas, ke la hipokriteco de s-ro de Beaufront superpaŝis ĉiujn eblajn limojn, ke „la sennombraj artikoloj skribitaj de s-ro Couturat inter 1908a kaj 1914a kaj de s-ro de Beaufront de 1908a ĝis 1935a neniam povas pravigi tiun maldecegan hipokritecon."

Kia estis do la taktiko de la du idistaj ĉefoj? Unue adoptigi Idon, kaj nur poste konigi la aŭtoron. Neniu sciis la sekreton. Iu hazardo ĝin malkovris. Skribante al s-ro Jespersen kaj en la sama tempo al s-ro de Beaufront, li eraris, metante la leterojn sub koverton. S-ro Jesperson ricevis la leteron destinitan al s-ro de Beaufront, kaj sufiĉe informiĝis pri la sekreta kunago de la du kunkulpuloj. Li ne silentis pri sia malkontenteco. Li postulegis, ke s-ro de Beaufront diru la veron; li klarigis, ke persista silento malutilus al la afero, ke oni komencas flustri mallaŭde, ke d-ro Zamenhof mem juĝas skandala la agmanieron de s-ro de Beaufront; fine li minacis memeksiĝi, li kaj s-ro Oswald kun li, se anonimeco pli longe daŭros. Kial s-ro Couturat ne deklaris tuj, ekde la unua momento, ke li estas aŭtoro de Ido? Li certe faris eraron de taktiko, por nenion pli diri. Sed oni komprenu lian embarason. Antaŭ ĉio, laŭ iu artikolo de la regularo, neniu aŭtoro de projekto povis partopreni en la komitato. Se s-ro Couturat konfesus, ke li estas patro de Ido, ĉiuj ekkrius, ke li laboris por si mem, por sia Ido, por sia sistemo; ke la tuta Delegacio estas pura komedio.

Lia eraro kuŝas en la elekto de homo, kiu, pro sia karaktero malhumila, ofendiĝema, ne estis amata, kies konserveman spiriton neniu nesciis, tiamaniere. ke reformo proponita de li ne ŝajnis sincera al la popolo esperantista. Plie, kiel la advokato de Esperanto povis, antaŭ la samaj juĝistoj, ne demetante sian talaron, defendi la projekton de s-ro Couturat? „Estas nekompreneble, ke s-ro Couturat kaj s-ro de Beaufront ne antaŭvidis la neeviteblan rezulton de tia artifiko; pli ĝuste, ili ĝin antaŭvidis, kaj pro tio elektis anonimecon, sed tio estis ankoraŭ pli mallerta. „La agemaj homoj", diras Berger, „ofte ne sufiĉe atentas al faktoroj psikologiaj". Lasu nin rideti. Laborema estis s-ro Couturat kaj precipe tre riĉa, kaj precize filozofo sperte kompetenta en psikologio; unuvorte, studĉambrulo!

S-ro Moch rajtis skribi al li, ke li estas vere hipnotigata de la projekto Ido. S-ro Foerster ankaŭ miris pri lia manko de diplomatio: „Se mi juĝas laŭ la tono de viaj leteroj al s-ro Boirac, mi havas la dolorigan impreson, ke vi suferas tre grave pro iu speco de ekscitego eble kaŭzita de troa laboro...."

Tre eble s-ro Couturat trograndigis la influon de s-ro de Beaufront; tre eble, ĝis la lasta momento, li esperis, ke d-ro Zamenhof akceptos solvon, reformojn, kiujn li jam parte skizis en 1904a.... En lasta analizo mi kliniĝas al la opinio, ke antaŭ la rezisto neatendita, kiun li renkontis, li ekkoleris, senpacienciĝis kaj trudordonis al la Lingva Komitato, ke ĝi cedu aŭ malaperu! Iom pripensu! Jen sciencisto, filozofo grandmerita, kiu forlasis siajn kutimajn studojn por sin dediĉi, sian tutan forton, inteligentecon al la problemo de lingvo internacia; kiu esploris ĉiujn sistemojn plej suprajajn aŭ plej profundajn, klare perceptis la kvalitojn, la difektojn de ĉiu, kaj, en la fino de tiom da analizoj, farinte sintezon de ĉio, kio ŝajnas plej perfekta, plej vivkapabla, siavice alportas plenan sistemon propran: certe li povas erari, la sperto, la vivo, la tempo decidos, kaj efektive decidis, sed ĝis tiam, ĉu tiu sciencisto sincera, tute ne profitema, ne rajtas esperi, ke oni lin kaj eĉ danke, aŭskultos, sekvos? Se kontraŭe li sin vidas multflanke atakata, kritikata, ĉikanata....

S-ron de Beaufront neniu kompatas, la occidentalistoj malpli ol la esperantistoj; s-ro de Wahl certigas, ke neniu homo estis pli malutilega al la lingvo internacia ol s-ro de Beaufront. Ne maljuna leono, kiel diris kelkaj amikoj, sed pli ĝuste

GRAFOJ, GRAFISTOJ AŬ GRAFIISTOJ?

Komparante la diversajn vortojn, finiĝantajn per *-grafio*, ni konstatas ian similecon inter ili: la pli multaj indikas la laborterenon: arton, teĥnikon, sciencon aŭ ion similan, pri kiu sin okupas iu profesiulo. La nomon de tiu profesiulo oni povas formi per *-isto: litografio — litografiisto*. Nebela tamen estas la duobla *i* en tia nomo.

Sed aparte de tiuj grafio-vortoj jam ekzistas nomoj por la koncernataj profesiuloj: *kaligrafio — kaligrafo*. Tiuj apartaj nomoj sonas pli bele kaj estas pli internaciaj, do pro tio preferindaj. Laŭ tio oni do prefere uzu: *kaligrafo, litografo, ĥemigrafo, tipografo, ksilografo, kartografo, topografo, geografo, radiografo, etnografo, kosmografo, zinkografo, hidrografo* por la profesia nomo, eĉ, se tiuj nomoj ne troviĝas en vortaro, sed estas tamen konsekvence formeblaj, kiel ekz. *pornografo*.

Aparte ni konsideru *stenografio*, ĉar ekzistas aparta verbo *stenografi*. El la unua vorto oni povas derivi *stenografiisto*, el la dua *stenografisto*. Preferinde tamen estas uzi analogie al la supre menciitaj formoj ankaŭ *stenografo*.
Ankaŭ *fotografi estas verbo;* do la profesiulo estas *fotografisto*, preferinde tamen *fotografo*. *Fotografio* do povas esti la nomo por la teĥniko kaj arto. Jam ekzistas *kromofotografio*.

Ekzistas tamen vortoj, finiĝantaj per *grafo*, kiuj indikas ne profesiulon, sed aparaton: *telegrafo, fonografo, kinematografo, hektografo*. La nomojn de l' profesiuloj oni do devas formi per *-isto: telegrafisto* k.s. Kaj la vortoj *telegrafio* k.t.p. estas uzeblaj por la teĥnika tereno. Jam ekzistas *radiotelegrafio*.

Aliaj grafio-vortoj indikas la rezulton de iu ago: *biografio, bibliografio, kakografio, aŭtobiografio, monografio*. La okupanto tamen povas esti *biografo, bibliografo* k.t.p.

Plena unuformeco inter ĉiuj ĉi vortoj do ne estas atingebla. Oni tamen klopodu atingi plejeblan unuformecon.
La samo koncernas multajn vortojn, finiĝantajn per *-logio: biologio — biologo* k.m.a.

KOREKTO.

El la artikolo „Historio" en la sept. n-o, pago 72a elfalis unu linio, pro kio la koncernata frazo fariĝis nekomprenebla. Oni legu la 7an linion de supre:
Krome, pere de la G.K. S.A.T. kaj la L.E.A. promesas, ke L.E.A. instigos siajn membrojn aliĝi al S.A.T., kaj S.A.T. reciproke alvokos siajn membrojn portopreni en la laboroj de la koncernata L.E.A.

REDAKCIA KORESPONDADO.

Al k-do B.J.O. en L.: Vi deziras posedi listojn da nomoj de birdoj, aliaj bestoj, floroj, arboj k.t.p. Jam antaŭ la milito ni regule publikigis sub „Esperanto en scienco kaj teĥniko" tiajn listojn da nomoj, kaj jam antaŭ longe ni intencis daŭrigi ĝin. Nur manko pri sufiĉe da spaco kaŭzis ĉiufoje prokraston. Tamen, vian deziron (ankaŭ aliaj jam esprimis similan deziron) ni baldaŭ plenumos.

Al s-ro M.C.B. en L.: Ni ne samopinias kiel vi pri la uzo de „io" por landnomoj. Eĉ ujo-ano devas, se li kapablas ĵuĝi objektive, konfesi, ke la praktiko akceptis ĝin. Tio tamen ne signifas, ke la praktiko elĵetis „ujo"! Ambaŭ estas uzataj, kaj estus malsaĝe ignori tiun fakton. Via aserto, ke „io" fariĝis distingilo de politika partio, estas subjektiva kaj kontraŭa al la vero. La senbaza plumbatalo inter ujo- kaj io-anoj jam ĉesis feliĉe, kaj ni ne deziras ĝin renovigi. Ni malŝatas fanatikecon, ankaŭ sur lingva tereno.
Pri „trajno" vi pravas. Ankaŭ ni ne vidas motivon por uzi tiun vorton. Ĝin la praktiko ne akceptis!

Al k-do M.L. en B.: Al la temo „Verbigitaj participoj" ni dediĉos siatempe detalan artikolon.

---

maljuna kameleono! Li batalis eĉ kontraŭ siaj propaj adeptoj pli progresemaj, forlasita de siaj plej intimaj kunlaborantoj. Li mortis en printempo de 1935a, sen parencoj, tute sola. Oni informiĝis, diras s-ro Berger, pri lia morto per la bulteno de la poŝtoficejo, longatempe poste....
Pacon al lia memoro! CAMILLE AYMONNIER.